mence de tiu ĉi jaro du junulinoj (unu
svedino, la alia ukrainino) tri monatojn
veturadis tra pluraj urboj de Svedio
(ĉefe suda teritorio); dum la vojaĝo ili
renkontiĝis kun junularo, plej parte tio
estis lernantoj de mezlernejoj; kaj
parolis pri Esperanto, pri avantaĝoj de
la lingvo kaj de tiuj, kiuj ĝin posedas. La
sekvajn tri monatojn (aprilo, majo,
junio) ili "vagadis" jam tra nia lando kaj
ripetis proksimume la samon dum
renkontiĝoj kun junularo, paroloj, eĉ
diskutoj.

En nia lando ili vizitis preskaŭ dek
loĝlokoj/urboj, plej parte tio estis
grandaj urboj. Kaj la renkontiĝoj okazis
jam ĉefe kun studentoj de superlerne-
joj, ne nur kun lernejoj. La knabinaj
"projektaninoj" sukcesis krome parto-
preni unu el ĉarmaj ukrainiaj E-aranĝ-
oj, nome: "Aroma Jalta", kiu estas orga-
nizata ĉiujare (jam 10 jarojn sinsekve)
sude de Krimea duoninsulo, kaj ĝui ties
etoson. Sed la plej grava atingo estas
tiu, ke post la renkontiĝoj en multaj
lokoj aperis pluraj deziroj pli proksime
konatiĝi kun la lingvo, eĉ eble lerni ĝin.

Similaj projektoj diversnivele (ne nur
la junularaj) vere povas alporti nur
pozitivajn rezultojn. Oni povus organizi
kaj prelegvojaĝojn de iuj esperantistoj,
kaj invitojn de bonaj alilandaj E-
instruistoj, kaj... kaj... kaj... Estus
bone starigi similajn pontojn inter
diversaj landoj, daŭrigi tian tradicion.

DMITRIJ CIBULEVSKIJ ARKIV, UKRAJNO

1) Vidu: "Enciklopedio de Esperanto".

2) Ĉi tie mi uzis la vorton "parenca", ĉar vere
laŭ historiaj notoj la unua duko de Ruslando
en IX-X-a jarcentoj Rjurik, kies nomon portas
la tuta dinastio de rusiaj dukoj/caroj (IX ĝis
XIX jarcentoj), kaj la sekvaj Oleg/Olaf kaj
Igorj/Ingvar venis de svedaj teritorioj; laŭ
oniĉoj eĉ la nomo Rjurik estas prenita laŭ
nomo de la loĝloko, de kie venis la unua duko.

Bonvenon al Printempa Semajno Internacia!

16-a PSI 17 - 24 aprilo 2000 St. Andreasberg Germanio

La Printempa Semajno Internacia (PSI) estas granda internacia renkontiĝo por la tuta familio. Ĝi okazas ĉiujare dum unu semajno ĉirkaŭ Pasko ie en Germanio kaj havas proksimume 150 partoprenantojn el 15 landoj.

PSI estas precipe familia seminario. La programo celas kontentigi samrajte plenkreskulojn, junulojn kaj infanojn. Sed tio ne ekskluzivas unuopulojn, ĉiu estas bona. Por infanoj okazas apartaj programeroj laŭ aĝgrupoj. Ĉu vi aŭ via partnero estas komencanto aŭ eĉ neesperantisto? Ne timu, vi estas bonvenaj! Ni aranĝas kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Sed ankaŭ aliaj programeroj konsideras la komencantojn.

6-a PLI Samtempe kaj samloke kun PSI okazas la Printempa Lernejo Internacia (PLI). Ĝi estas speciala aranĝo por gejunuloj inter proksimume 10 kaj 16 jaroj, kiuj almenaŭ iomete parolas la internacian lingvon. Por ili okazas apartaj kursoj pri kaj en Esperanto. Ili loĝas en komunaj ĉambroj kaj lernas, ludas kaj festas kune. Kompreneble la gepatroj povas dume PSI-umi.

Kunvivado inter Oriento kaj Okcidento

Programo Eŭropo 2000 – *Kunvivado de la generacioj en oriento kaj okcidento*. La seminario enhavas kaj laborajn kaj distrajn elementojn. Ĝi estas malfermita al ĉi-speciaj interesaj eroj en kaj ekster la kadra temo. Dum la lastaj jaroj aro da programeroj fariĝis jam tradiciaj:

Diskutgrupoj kaj laborgrupoj pri plej diversaj temoj. Infanoj povas ĉiutage ĝui "Mazi-horojn". Prelegoj pri diversaj temoj. Kursoj pri ludoj, dancoj, kantoj, muziko... Lingvokursoj por komencantoj, progresintoj kaj infanoj. Nacilingvaj kursetoj; parolantoj de diversaj lingvoj prezentas sian lingvon en mallonga kurseto. Artaj manlaboroj pri ornamaĵoj, pentrado, ŝtofoj, origamio... Ekskursoj al vidindaĵoj en la regiono kaj najbaraj urboj. Kineja horo;

Ĉiutage je fiksita horo vi povas spekti video-filmojn aŭ lumbildojn. Bazaro; en nia (pul-)bazaro vi povas vendi aĵojn al aliaj partoprenantoj. Vespera kultura programo ĉi-jare kun la sveda rokgrupo *Persono*. Vespera trinkejo; ĝis malfrue nokte vi povas kunestadi en nia trinkejo. Kaj...eble interesaj programeroj, kiujn vi ofertos al ni?!

Prezentoj bonvenaj

Ĉu vi havas ion interesan por prezenti en PSI? Eble interesan profesion, interesajn hobiajn aŭ interesajn kapablojn? Ne hezitu proponi vin al ni.

Kotizoj

Kotizoj (en eŭroj) simpla ĉambro kun lavabo/luksa ĉambro kun duŝo/necesejo.

0 - 3 jaroj(sen propra lito):	00
4 - 10 jaroj:	90/120
11 - 15 jaroj:	125/165
16 - 25 jaroj:	160/215
plenkreskuloj:	190/245
unulita ĉambro:	235/295

Rabato: 10 eŭroj por fruaj aliĝintoj ĝis 31.01.2000

Rabato: 15 eŭroj por fruegaj aliĝintoj ĝis 30.11.1999

La rabaton vi ricevos en formo de kupono, per kiu vi povas pagi en nia kafejo/trinkejo. La kotizo inkluzivas loĝadon, manĝojn kaj programon.

Ekskursoj estas surloke aparte pagendaj. Materialon oni pagas laŭ uzita kvanto surloke.

Via aliĝo ekvalidas nur kun antaŭpago de minimume 25 eŭroj por ĉiu persono, sume minimume 50 eŭroj, ĝi estas parto de la kotizo.

Germana Esperanto-Asocio Wolfgang Bohr, Johannes Kirschweg-Str. 11, D-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler. Telefono: +49-2641-4885, Fakso: +49-2641-9786-66. Retpoŝto: <psi@esperanto.de>. Pagoj: Konto 275548-807, Postgiroamt München (BLZ 700 100 80) Deutscher Esperanto-Bund e.V., rimarko: "16-a PSI"

La SEF-kongreso en 2000

La estraro de SEF decidis ke la venontjara kongreso okazos en Helsingborg de la 20-a ĝis 21-a de majo. Ceteraj informoj pri la kongreso en venonta numero de La Espero. Ĉu eĉ pli aktiva ĉi-foje?

Seminario de Esperanto-Instituto

Raporto de la seminario de la Sveda E-Instituto, kiu okazis de la 18a ĝis la 19a de septembro en la sveda E-kursejo en Vermlando.

Inter la 50 partoprenintoj troviĝis 7 eksterlandanoj. Kvin de tiuj el Ĉinio, Tanzanio, Finnlando, Litovio kaj Norvegio. Kaj du el Danio. Tri de tiuj estas partoprenantaj la E-kurson en la Popolaltlernejo de Karlskoga. Ili tre bone povis sekvi la prelegojn post mallonga studado.

La prelegintoj estis Anna Ritamäki kiu estas juna ĵurnalistino en Finnlando kaj spertulo pri interŝtataj kaj speciale la "Eŭropa Unio" juro. (ŝi havas personajn spertojn de la Komisiono). Anna ankaŭ havas multjaran sperton en la skolita movado kaj la junularorganizaĵo TEJO. Ŝi (kompreneble) parolis pri la Lingvouzo en la organoj de EU.

Svetlana Kotelnikova el Rusio, nun loĝanta en Gotenburgo, estas mikrobiologo. Ŝi klarigis al ni "La originon de la vivo". Svetlana laboras en la instituto de molekula biologio ĉe la universitato de Gotenburgo.

La konata komputilisto ankaŭ de Gotenburgo, Martin Weichert, rakontis pri sia ŝatokupo la bildliteraturo. Martin trairis la historion de tiu literaturo helpe de projekciitaj bildoj kaj montris ankaŭ E-ekzemplojn.

Costantine Mashauri de Tanzanio unu de la iamaj kaj nunaj aktivuloj de la E-movado en la lando, donis ekzemplojn de la lingva diverseco en sia lando. Costa opinias ke estas malfacile scii kiu lingvo estas sia gepatra lingvo.

En venontaj programoj [de Radio Västerås] vi aŭdos iom pli pri tiuj prelegoj...

WIM POSTHUMA

ALP-ADRIA KONFERENCO

Alp-Adria Konferenco okazos je 1999-10-07 ĝis 10-10 en Pula, Kroatio, kun la temo "Kulturaj rajtoj de etnaj malplimulto". En la konferenca urbo troviĝas multaj historiaj vidindaĵoj. Informoj: Kroata E-ista unuiĝo: <hes@esperanto.nu>.

(EL INTERRETO)

Auld 75 jaroj

SIMPATIAN KAJERON, "WILLIAM AULD 75 JAROJ", ELDONIS LA RUSA SEZONOJ. MALGRAŬ NEMUITE DA PAĜOJ, LA LIBRO ESTAS RIĈENHAVA. LA AUTOBIOGRAFIETON DE LA LIBRO AULD NE SKRIBIS MEM, TAMEN ĜI ESTAS AŬTOBIOGRAFIO.

Aleksander Korjenko intervjuis Auld, kaj poste la verkisto kontrolis kaj iom korektis la tekston. Li ankaŭ elektis,

kompilis poemaron al la libro, kun kaj propraj poemoj kaj tradukitaj (Ne malkutimas ke poetoj kelkfoje kombinas kaj siajn poemojn kaj interpretojn de poemoj de kolegoj en siaj poemaroj). Auld prezentas anglajn poetojn kiujn mi tute ne konas, sed ankaŭ ekzemple poemojn el Aniaro de Harry Martinsson, kiun Auld tradukis kune kun la svedo Bertil Nilsson. Auld rakontis ke li tre ŝatas Aniaron.

Auld skribas ke lia vivhistorio ne estas interesa, sed estas tre bone por literaturamantoj legi vivigajn sciigojn pri ekzemple lia esperantovivo, liaj unuaj paŝoj kiel juna esperantopeto. Li publikigis en la volumo

"Kvarope" kune kun tri aliaj esperanto-poetoj, kaj 1956 aperis la ĉefverko de Auld, "La infana raso".

Kiam Auld rakontas pri sia esperanta vivo, li jetas lumon sur grava parto de la historio de esperanto. Ĝojige estas legi pri kiam Auld kandidatiĝis al Nobelpremio de la esperanta verkista organizo kaj de la esperanta PEN-klubo. Auld ankaŭ aldonis kelkajn fotojn el sia albumo.

Estas ĝuo legi la poemojn de Auld, nia plej fama vivanta poeto. La libreto estas bonvena prezento de la Auld-a verkado al ni esperantistoj!

JARL HAMMARBERG

Nova lernilo pro la projekto Interkulturo

OKULO

Celgrupo de la libro inter ses-kaj dek-jaruloj. La libro volas sproni dialogon kaj aktivan paroladon, pere de simplaj frazoj, tuj de la komenco de la kurso. Ene estas kanto, poemo, modelaj leteroj kaj ret-leteroj kaj komenco de bild-stria serio "Mira – aventuroj de detektivo".



Prezentitaj estas diversnaciaj roluloj, la kontinentoj kaj komputiloj, esencaj partoj de la interkultura projekto. Prononc-ekzerciloj estas donitaj. La ciferoforma rolulo Okulo estas la gvidanto tra la libro, kies nekutima aspekto estas superita nur de tiu de Zumplo, didaktite kunmetita ekstertera gasto (kun kvar oreloj, kvin kruoj, ses brakoj...) La kajero utiligas 280 radikojn, el kiuj 40 estas verboj – kaj transitivaj kaj netransitivaj, sed precipe konkretaj kaj aktivaj.

Prezo ĉe UEA kaj ILEI 4,50 eŭroj. Sezona rabato ekde 3 ekz. La prezo ĉe ILEI inkluzivas surfacajn sendokostojn. Ĉe UEA aldonu 10%. Lernejoj en la projekto Interkulturo ricevas minimume trionan rabaton (prezo 3,00 eŭroj) mendante de ILEI.

Por la pli aĝaj lernantoj ILEI rekomendas la tri-kajeran serion *Tendaraj Tagoj* kaj kantlibron de s-ro J. Rømmesmo. ILEI ofertas ilin je specialaj prezoj (ekde 3 ekz.) al partoprenantaj klasoj. *Tendaraj Tagoj 1* 3,50 eŭroj, *Tendaraj Tagoj 2* kaj *3* po 4,00 eŭroj kaj la kantlibro *Fantaziaĵoj kaj Kantoj por Infanoj* 2,40 eŭroj.

ILEI, pf. 193, HU-1368 Budapest, Hungario, <stefan.macgill@galamb.net>.

Okulo, kajero 1, Stefan MacGill, ILEI, Budapest, 1999. Ilustris Monika Molnar kun plen-koloraj paĝoj; 44 p.

Sten Johansson honorita en Berlino

Nia sveda novelisto Sten Johansson denove distingiĝis per honoraj premioj. Dum la UK en Berlino oni decidis premi liajn verkojn ne nur per la unua premio sed ankaŭ per la dua premio de prozo en la belartaj konkursoj.

La unuan premion li gajnis per "Nepoj en torento" kaj la duan per "Kastelo de revoj". La trian premion Lena Karpunina el Germanio ricevis pro "La ridinda leteroj". Du dek verkoj de dek kvar aŭtoroj el dek du landoj partoprenis.

Cetere la hispano Antonio Valén ricevis la unuan premion de poezio pro sia "Amfer' iama". Pri tetraĵoj la brito Paul Gubbins gajnis ĉiujn tri premiojn. La premion "Luigi Minnaja" pri eseo estis donita al la portugalo Goncalo Neves pro "Niaj verboj sen veproj". En la kategorio kanto Valentina Maria Nan el Rumanio gajnis la unuan premion per "Ami".

La infanlibro de la jaro fariĝis "Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapic" de Ivana Brlic-Mazuranic kun traduko de Maja Tiölar el Kroatio. La unua premio pro vidbendo estis donita al Ralf Kruse el Germanio pro "Esperanto in Mecklenburg und Vorpommern 1905-44".

RED

Aĉetu libron kristnaska aŭ novjara donaco...

Aĉetu la plej novajn librojn. Eble kiel kristnaskdonaco? Ofte estas pli malmultekostaj ol tiuj de la libroservo de UEA!

Internacia Kongresa Universitato, 81 paĝoj Prelegoj dum la UK en Berlino de Alan. J. Bishop, Eva Bojaĝieva, Marjorie Boulton, Hans Eichhorn, Reinhard Fössmeier, Humphrey Tonkin, Maria Rafaela Urueña. Redaktas Michela Lipari

Kr 55

Lingva arto, 217 paĝoj. Jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton (23 aŭtoroj omaĝas al la 75-jaraj jubileantoj).

Kr 100

Higiene de l'murdisto, romano, 151 paĝoj. El la franca tradukita de Armela Le Quint kaj Ĵak la Puil. Juna ĵurnalistino malkovras sekretojn intervjuante mizantropan Nobel-premiiton literaturan.

Kr 75

Maljunulino, kiu paŝis en la maro, 348 paĝoj. El la franca tradukita de Armela Le Quint kaj Ĵak la Puil. Burleska historio de maljuna aventuristino, kiu elektas heredanton antaŭ ol abdikii kaj instruas lin pri ŝtelarto de San-Antonio.

Kr 195

Gvidilo pri Homaj Rajtoj, 140 paĝoj. El la angla tradukita de Edmund Grimley Evans. La aŭtoro Leah Levin estas brita fakulo pri internacia juro. Demandoj kaj respondoj.

Kr 78

Monumente pri Esperanto, 111 paĝoj. Hugo Röllinger Ilustrita dokumentado pri 1044 monumentoj, bustoj pri Esperanto en 54 landoj (en stratoj, placoj, kulturcentroj, parkoj kaj pontoj). 86 fotoj kaj pluraj tabeloj. Redaktis Thomas Bormann.

Kr 65

Tria kolekto da krimnoveloj, 84 paĝoj. Sep noveloj originale verkitaj en Esperanto de Ronald Cecil Gates. Libroservo de Australia Esperanto-Asocio.

Kr 70

La nuda feino, 108 paĝoj (poezia). Ok, ne tro erotikaj rakontoj, kiuj havas interligilon unu kun la alia kaj okazas en ne menciita lando. El la nederlanda de Flandra E-o-Ligo.

Kr 120

Kvin virinoj de amoro, 155 paĝoj. El la japana de Miyamoto Masao. De la serio Oriento - Okcidento.

Kr 160

Hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ, 95 paĝoj. Dek du noveloj de Bernard Golden.

Kr 45

Orm la ruĝa, Frans G. Bengtsson, 214 paĝoj. Tradukis Bertil Nilsson.

Kr 135

La diplomato kiu ridis, 61 paĝoj. Naŭ rakontoj de la aŭstralia diplomato kaj esperantisto Ralph Harry, de siaj veraj travivaĵoj dum la diplomata vivo, kiuj estas amuzaj kaj pensigaj. Reviziita teksto de la angla "The diplomat who laughed".

Kr 95

Kaverno apud la maro, 227 paĝoj. Novelaro originale en Esperanto de Bertram Potts.

Kr 58

Kunvojaĝu, 240 paĝoj, Internacia kurso de Esperanto por studentoj kaj plenkreskuloj de Paul Gubbins, ĵurnalista kaj kunlaboranto de Monato. Paul Gubbins gajnis premion en la belartaj konkursoj de UEA en la branĉo "teatraĵo".

Kr 125

Internaciaj ekzamenoj de ILEI & UEA, 33 paĝoj. Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj de la ekzamenoj kun la celaro, postularo, regularo kaj specimenaĵoj testoj.

Kr 25

... aŭ abonu gazeton!

Svenska Esperanto-Förbundet erbjuder sina medlemmar att prenumerera på esperantotidningar för år 2000. Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på postgiro

14 74 29-5, SEF, specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar, som avses. Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos:

Lisbet Andreasson Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby tel 0415-50152.

Tidning	nr/år	pris kr
El Popola Cinio	12	300
Esperanta Finnlando	6	120
Esperanto	11	275
Esperanto Dokumentoj	10	215
Esperanto en Danio	5	125*
Eventoj	23	300
Retventoj, nästan dagligen		180
Fonto	12	255*
Heroldo	16	250
Heroldo, flygpost	16	335
ICEM	4	165
Informoj de EAE	4	75
Juna Amiko**	4	95
Komencanto	8	115
Kontakto	6	165
La Hirundo	8	100
La Jaro (kalender)		47
La Kancerkliniko	5	180
La Ondo	12	200
Literatura Foiro	6	235
Literatura Foiro, flygpost	6	300
Litova Stelo	6	100
Monato	12	360
Monato, flygpost	12	410
Norvega Esperantisto	6	85
Oomoto	2	100
Rok'Gazet	1	145 (fjör fyra nummer)
Scienca Revuo	4	185
TEJO-tutmonde	4	85

* priser för 2000 har ännu inte meddelats. Höjningar kan ske. ** rabatt vid mer än 1 ex.



La bona lingvo, de Claude Piron. 110 paĝoj. La verko pritraktas diversajn punktojn rilate al la fenomeno Esperanto. Ĉu estas psikologie, socie, morale, arte kaj strukture bona lingvo? Internacia Eo-Muzeo.

Kr 115

Billy, komputila ludo en Esperanto. Ludo kun pli ol 150 ludniveloj en Esperanto. Ne perforta sed amika ludo por minimume kvin-jaraj infanoj. Tre fajna grafiko kaj sonefektoj, tridimensiaj figuroj. Du niveloj de lingva facileco. Por IBM-kongruaj komputiloj. Aktualigu ĝin vizitante la hejmpaĝon www.esperanto.dk/billy.

Kr 180

Diversaj Sonkasedoj, interalie de la duo Ĵomart kaj Nataŝa kaj la popolkantgrupo Kajto. Malsamaj prezoj.

90 - 150 kr

Sveda Esperanto-Federacio, Vikingag. 24, 113 42 Stockholm. Tel: +46(0)8-34 08 00, Telefakso: +46 (0)8-34 08 10.

Så kommer vi igen!



Det är oundvikligt att se hur esperantorörelsen under de senaste åren krympt i Sverige. Man kan diskutera länge vad som är orsaken eller orsakerna. Det är nog bäst ändå, att satsa krafterna på att planera för framtiden, att identifiera orsakerna och försöka finna lösningar på hur vi skall kunna eliminera orsakerna, kanske helt röja bort några av dem.

Jag tror, att vi måste satsa på att bekräfta och utnyttja det som vi har gemensamt, för att kunna komma igen. Därför har jag satt några av mina funderingar på papper, utan att göra några försök att ta reda på vad som kan vara igång på andra håll... Läs detta och reagera!

Idéer för att stärka esperantorörelsen

Marknadsföringsseminarium: Det behövs gemensamma ansträngningar för att stärka esperantorörelsen i Sverige. Vi måste samla krafterna och satsa på en gemensam aktivitet för att nå ut. Det kostar kraft och pengar; vi har lite av bägge. En gemensam modell ger bättre styrka än de nuvarande splittrade insatserna.

Till seminariet, som kan genomföras av vilken som helst av organisationerna, eller vilken konstellation som helst, skall samtliga organisationer inbjudas. Minimikravet på resultat av seminariet skall vara en gemensam handlingsplan och en gemensam arbetsgrupp, som har som uppgift att

ta fram ett material och en handledning för agerande. Materialet skall bestå av ett informationspaket, som så långt som möjligt är gemensamt: broschyrer, hemsidor, video osv. Handlingsplanen skall omfatta både planering av aktiviteter och finansiering. Seminariet måste genomföras under vintern 1999/2000.

Aktiviteter under år 2000: Samarbeta om planering av aktiviteter inom hela esperantorörelsen i Sverige och verksamheten vid Esperanto-Gården. Esperanto-Gården är det projekt som mest enat esperantorörelsen under senare år. Verksamheten vid Esperanto-Gården behöver också stärkas. Det är vårt gemensamma ansvar att se till att det sker. Det är också lättare, för marknaden bör vara större: fler människor kan ha anledning att övernatta i Värmland (och på så sätt sekundärt stödja esperantorörelsen) än de, som är beredda på att lära sig ett nytt språk för att utveckla sig.

ANITA DAGMARSDOTTER

MALKONVENAJ KAJ KONVENAJ VORTOJ

La Espero numero 3 1999 donis al mi emon skribe esprimi mian opinion pri kelkaj aferoj.

Post artikolo pri la jarkongreso estas resumono en la sveda. Mi ne kritikis la resumono, sed la parto pri la filmo de 1965 laŭ mi ne devus enhavi kritikon pri la prononcado kaj informo pri aldono de anglaj vortoj. Persono, kiu ne konas Esperanton povus pensi, ke la lingvo ne taŭgas por plena prezentado.

Kiam mi estis nova esperantistino, mi ĉe jarkunvenoj konstatis, ke ne nur mi sed ankaŭ aliaj ĉeestantoj estimis la veteranojn de nia movado pro ilia laboro farita kaj farata. En multaj jaroj La Espero preskaŭ neniam informas pri forpaso de membroj, eĉ ne pri veraj aktivuloj. Ne necesas longaj artikoloj, sed nur informo de nia kasisto pri nomo de la koncernaj personoj. Tiel ni, kiuj konis ilin, havus eblecon sendi mondonacon al SEF memore de ili. Ekz. kiam aperis bona artikolo pri Lennart Åberg, pluraj sendis al SEF donacojn, eĉ pli multaj ol aperis en La Espero. Sed de lia edzino

venis danko kiel konfirmo pri bona raporto de la kasisto. Pri Sune Ahlm kaj Gunhild Tistad mi neniam legis en La Espero, malgraŭ tio, ke ili ambaŭ estis tre aktivaj. Same mankis informo pri multaj aliaj.

Kaj mi fine opinias, ke La Espero ne aperigu informon pri aĉeto de domparto eksterlande. Tio ne valoras al SEF, laŭ mi.

GULLI SVENSSON, MALMÖ

Komento:

Estas mi, kiu skribis la malkonvenajn vortojn! Kaj mi dankas por la vidpunktoj de Gulli Svensson. Mi pensis ke eble troviĝas kelkaj de la legantoj, kiuj volus rapide legi pri kio okazis dum la kongreso. Tial mi skribis la mallongajon. Se tio kreis problemon, mi bedaŭras. Mi nur volis priskribi la plej gravajn aferojn, pritraktatajn en la artikolo, sen ia ajn cenzuro. Mia intenco ne estis taksati la enhavon de la artikolo. Esper-eble mia resumono ne estigis tro grandan damaĝon. Tiukaze mi petas pardonon!

HO

Språk för hela Europa

Flera esperantister har reagerat mot samma ledare i Dagens Nyheter (DN) som omtalades i förra numret av La Espero. Roland Larsson i Enskede drar sig inte för att dra en lans mot "draken" DN i en insändare (22/8 1999):

"... Det är naturligtvis värdefullt för alla folk att få ha sitt modersmål som svarar mot just detta folks uttrycksbehov. Därutöver borde man, exempelvis inom Europa kunna komma överens om ett gemensamt språk för kommunikation och kultur. Att upphöja ett nationellt språk, exempelvis engelska, till en sådan position är av politiska skäl omöjligt. Engelska är också ett komplicerat och föga logiskt språk. Det finns en förhållandevis "enkel" lösning på problemet. Lösningen heter esperanto... Om Europas länder enas om att införa esperanto som första främmande (och kanske enda obligatoriska) språk vid sidan av modersmålet (och eventuellt annat nationellt språk) kommer vi snart att ha en välfungerande språkgemenskap i Europa... Esperanto är också ett kulturspråk med litteratur, teater, poesi etcetera, både i original och med översättningar till och från andra språk..."

DONACOJ

KLUBO MIL:

Till minne av Charlott Andersson 10.000 kr.
Ingemar Nordin, Stockholm 1.000 kr.
Torsten och Gertrud Lund, Malmö 1.000 kr.
Britta Rehm, Göteborg 1.000 kr.

ÖVRIGA GÄVOR:

MEMORE AL SVEN JONSSON, Borlänge Esperantoklubb 200 kr.
MEMORE AL ANNA LISA LISS, Falu Borlänge Esperantoklubb 200 kr.
EL TESTAMENTO Febe Sandkvist, Viken 1.000 kr
RONDO LANGLET (aŭtoĝiro) Bengt Nordlöf, Farsta 50 kr monate.
Årjängs Esperantoklubb 140 kr.
Leif Nordenstorm, Boden 730 kr.
Hans Hjortzberg-Nordlund, Särö 20 kr.
Franko Luin, Tyresö 250 kr.
Esperanto Väsbj 470 kr.
Anna-Karin Petersson, Hässleholm 200 kr.
Anna Maria Danell, Vänge 35 kr.

SEF kore dankas pro la donacoj. Novaj donacoj bonvenaj al poŝtĝiro de SEF 2012-3 aŭ per aŭtoĝiro al Rondo Langlet.

FÖRENINGSBREV

Sten Svenonius
Vendelsfridsg 4C
21764 Malmö



Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

UEA-avgiften

Under de första åren av esperantos historia utvecklades det från idé till ett fullvärdigt språk med kultur. Varken språket eller kulturen är ännu helt världsomspännande, därför arbetar UEA vidare under det andra århundradet med att sprida kännedom om esperanto, undervisa i språket samt öka dess användningsområde. Till detta behövs din hjälp. För din egen del betyder det, att du får UEA:s årsbok med namn och adresser på delegater i hundratalet länder, och om du är MA-medlem, får du även tidningen Esperanto, som ger dig värdefull information om vad som händer i esperantovärlden. Dessutom ger medlemskapet dig rätt till betydligt lägre kongressavgift. Du betalar avgiften genom att sätta in pengarna på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto. Ange på talongen vad pengarna avser.

UEA behöver dig, Du behöver UEA!

Med vänlig hälsning

Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455,
242 94 Hörby; tel. 0415-501 52.

Avgifterna för år 2000 är följande:

MA Direktmedlem med årsbok och tidningen Esperanto. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får Kontakto. Ange födselsår! 430 kr

MJ Direktmedlem med årsbok. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får Kontakto. Ange födselsår! 170 kr

MG Direktmedlem med Gvidlibro. Ger inte nersatt kongressavgift. 70 kr

SZ Avgift för Societo Zamenhof, särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA. 860 kr

PT Patrono de TEJO, får tidningen Kontakto. 510 kr

DM Dumviva Membro, betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken. 10.750 kr

DPat Dumviva Patrono, betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken och blir därtill ständig medlem i Societo Zamenhof. 107.500 kr

DPT Dumviva Patrono de TEJO, betalar för hela livet och får tidningen Kontakto. 12.750 kr

Avgifter Tel Aviv år 2 000

Anmälningsavgifter (svenska kronor)	-31/12	-31/3-00	1/4—
1. Icke direkt medlem i UEA	1230	1530	1840
2. Direkt medlem i UEA (ej MG)	980	1230	1470
3. Medföljande, handikappad eller ungdom (född mellan 70-01-01 och 79-12-31), som inte är medlem i UEA	730	917	1095
4. Medföljande, handikappad eller ungdom, som är medlem i UEA	490	614	730

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 79 12 31 betalar ingen kongressavgift. I händelse av kursändring kan kongressavgiften komma att justeras. Anmälningsblankett för kongressen kan beställas hos: Lisbet Andreasson Södra Rörum pl 455 242 94 Hörby tel 0415-50152

Blanketten skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till postgiro 14 74 29-5, Svenska Esperanto-Förbundet, Specialkonto.

SERĈATA

Amikoj! Akrigu viajn tondilojn, eltondu kaj sendu artikolojn kiujn vi vidas en viaj gazetoj pri Esperanto al la kolektanto de SEF kun adreso: Ivar Nilsson, Klövervägen 26, 903 52 UMEÅ. Notu tiun adreson en via notlibro por memoro.

